

Signifo kaj graveco de la majaj tagoj antaŭ la kontraŭrevolucio

Andreu Nin



La tragikaj eventoj, okazintaj ĉe Barcelono je la unuaj majaj tagoj, ne estas klarigeblaj, kiel iuj pretendis, de nura sensaĝa eksplodo aŭ kolektiva freneza ago. Eventoj de tia graveco, kiu lanĉis rimarkinde grandajn amasojn al la lukto, banis el sango la stratojn de la kataluna ĉefurbo kaj kostis la vivon de centoj da homoj, ne okazas sen kialo sed obeas povoplenajn kaj profundajn kaŭzoj.

Restu por la sentemaj etburĝoj "bedaŭri" la okazintaĵojn sen atenti la kialojn, determinantajn la faktojn; restu por la kontraŭrevoluciuloj –nur interesiĝintaj sufoki la revolucion– kondamni la movadon. La devo de la veraj revoluciuloj estas analizi la kialojn, kiuj produktis la okazintaĵojn, kaj eltiri la endajn instruojn el ili.

La faŝista militribeło

La faŝista ribelo de la 19a de julio ne estis nura ribelago de "perfidaj" militis-

toj, sed la kulmino per akra kaj perforta kielo de la lukto reganta ĉe Hispanio inter la revolucio kaj la kontraŭrevolucio. La sukceso de la laborista-respublikana bloko je la balotadoj de la 16a de februaro kaj la sekva starigado de maldekstrema registaro revivigis la demokratajn iluziigojn –serioze disfenditajn– de la amasoj, sed tiuj ĉi iluziigoj ekbrilis efemere. La laborista klaso taŭgis noti tre frue ke, malgraŭ ĝia malvenko je la urnoj, la reakcio ne senarmiĝis, sed plenkontraŭe ĝi pretiĝis per duobla streĉo por ĵetiĝi al la strato cele de bari la antaŭeniron de la proleta revolucio kaj starigi diktaturan reĝimon. La julia ribelo, okazinta post kvin monatoj de registara sperto montranta la plenan netaŭgecon de la etburĝa maldekstro por fini la faŝistan danĝeron kaj por solvi progreseme la politikajn problemojn stariĝintajn ĉe la lando, konfirmis plene la vidpunkton ree kaj ree esprimitan de la POUM¹: ke la maldekstrema eksperimento estis fiaskonta, ke la batalo ne estis starigata inter la demokratio kaj la faŝismo sed inter la faŝismo kaj la socialismo, ke tiu batalo estos perarmila kaj ke tiu estos solvinta favore al la laboristoj kaj kontraŭe al la faŝismo nur pere de la venko de la proleta revolucio kaj la sekva alprenado de la povo fare de la laborista klaso, kiu estis solvonta la malfacilaĵojn de burĝdemokratia revolucio kaj samtempe ekironta la vojon al la socialista transformo de la socio.

La milito kaj la revolucio

Danke al la grandioza heroeco de la laborista klaso, nerompeble rezoluta ĝismorte lukti por malebligi la venkon de la faŝismo, la militista ribelo estis frakazata la 19an de julio ĉe Barcelono, Madrido kaj Valencio kaj, danke al tiu heroeco malavare oferita poste je la batalejoj de la miloj da laboristoj rekrutiĝintaj plentuziasme ekde la unua momento je la milicoj, Franko ne atingis la militistan venkon, kiun li pritaksis certa kaj tuja, kaj kiu post dek monatoj de intercivitana milito aperas ĉiam malpli probabla.

Nu, samtempe ke oni frakasigis la faŝistan ribelon ĉe la plej gravaj urboj kaj oni ekis la militan lukton ĉe la batalfrontoj, la laboristoj kreis revoluciajn komitatojn kaj alproprigis la fabrikojn, la kamparanoj ekposedis la kampojn, oni forbruligis manaĝejojn kaj preĝejojn –fokusojn de faŝista reakcio–, unuvorte ekiĝis la revolucio kaj la malnovaj burĝpovaj aparatoj fantomiĝis. Milito kaj revolucio aperis do nedisigeblaj ekde la unua momento. Venkita la ribelo, la laboristoj ekis la revolucion taskon, kies atingojn ili defendis kaj daŭre defendas je la tranĉeoj. Pretendi ĉe Katalunio, kiel pretendas la tielnomina Hispana Komunista Partio kaj la PSUC², ke la laboristoj, batalantaj ĉe la frontoj, batalu por la demokratia respubliko, estas perfidi la proletaron, pretigi la kampon por nova kaj

1 POUM: Partit Obrer d'Unificació Marxista (Laborista Partio pri Marksista Unuiĝo). Oni vidu artikolon ĉe la Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki/POUM>) kaj la duan ĉapitron de SEMPRÚN-MAŬRA: *Revolucio kaj kontraŭrevolucio en Katalunio* (<http://www.enxarxa.com/esperanto/SEMPRUN%20Revolucio%20kaj%20kontraurevolucio.pdf>)

2 PCE: Partido Comunista de España (Hispana Komunista Partio), PSUC: Partit Socialista Unificat de Catalunya (Kataluna Unuiĝinta Socialista Partio). Oni vidu la duan ĉapitron de SEMPRÚN-MAŬRA: *Revolucio kaj kontraŭrevolucio en Katalunio* (<http://www.enxarxa.com/esperanto/SEMPRUN%20Revolucio%20kaj%20kontraurevolucio.pdf>)

sukcesa atako de la faŝista reakcio.

Neniu lasu impresi sin per la argumento pri tio, ke la batalo por la socialista revolucio ĉe la ariergardo favoras la celojn de la malamiko ĉe la fronto. Plenkontraŭe, nur aŭdaca revolucia sendube socialista politiko ĉe la ariergardo taŭgas doni al la batalantoj la kuraĝon kaj la moralan forton, kiu igos ilin malvenkeblaj, kaj organizi la ekonomion kaj la militindustriojn per la necesa eficeco por atingi rapidan kaj platigantan militan venkon.

La antaŭeniĝo de la kontraŭevolucio

Tamen, per espekulado pri la "malfacilaĵoj de la milito" la respublikana burĝaro, uzante kiel ilojn la reformemajn partiojn –la oficialan Komunistan Partion kaj la PSUC-on ĉiokaze–, klopodas per persista kaj sistema laboro sukfoki la proletan revolucion: malpliigante senĉese la atingojn de la laborista klaso, persekutante ĝiajn organizojn kaj gazetaron cele de restatigi la maŝinaron de la burĝa ŝtato kaj firmigi la kapitalistan regadon.

La plej gravaj elmontraĵoj de la kontraŭevolucia plano estis: la forigo de la POUM el la registaro de la *Generalitat*³, la senarmiligo, ĝis nun parte, de la laborista klaso, la persekutado al la gazeto de la CNT⁴ ĉe Madrido, la ĉesigon de la *Batalla*⁵, la konfisko de la presilo de la *Combatiente Rojo*⁶ kaj de la radioelsendilo de nia partio en la respublika ĉefurbo, la enkarcerigo de la Regiona Komitato de la CNT en Biskajo, la ĉesigo de *Nosotros*⁷ ĉe Valencio, la enkarcerigo de Maroto, la brava anarĥiista aktivulo, ĉe Almerio, la dekretoj pri publika ordo kaj la ĉesigo de la popolaj tribunaloj ĉe Katalunio, la ofensivo kontraŭ la revoluciaj standardoj cele al ties anstataŭigo pere de "nacia" standardo, la klopodo restarigi la malnovan burĝan armeon per la kreado de popola armeo el aŭtomatoj, sen revolucia spirito, je la servo de la burĝa demokratio, la starigado de la politika cenzuro, la ofensivo kontraŭ la kontrolaj patroloj, ktp. Paralele al la starigado de tiu ĉi kontraŭevolucia plano, oni realigis sisteman misfamigan kaj senkredigan kampanjon kontraŭ la CNT kaj kontraŭ la POUM, oni denoncis iliajn aliĝintojn, kiuj per plejaj sinoferoj kaj heroeco kontribuis al la milito kontraŭ la faŝismo, kiel agentojn de Hitler kaj Mussolini, utiligante ĉiujn rimedoj kaj agnoskeblajn kaj neagnoskeblajn por starigi la monopolon de partio prae komunistaj kaj revolucia, sed hodiaŭ sin fordoninta je korpo kaj animo al la burĝaro, maĥinacianta manovrojn kaj kampanjojn kontraŭ la Komitatoj, sabo-

3 *Generalitat de Catalunya*: kataluna aŭtonoma registaro (Ĝeneraleco de Katalunio). Oni vidu artikolon ĉe la Vikipedio (http://eo.wikipedia.org/wiki/Generalitat_de_Catalunya)

4 CNT: Confederación Nacional del Trabajo (Nacia Konfederacio de la Laboro). Oni vidu artikolon ĉe la Vikipedio (http://eo.wikipedia.org/wiki/Confederaci%C3%B3n_Nacional_del_Trabajo) kaj la duan ĉapitron de SEMPRÚN-MAŬRA: *Revolucio kaj kontraŭevolucio en Katalunio* (<http://www.enxarxa.com/esperanto/SEMPRUN%20Revolucio%20kaj%20kontraurevolucio.pdf>)

5 *La Batalo*. Centra esprimorgano de la POUM

6 *Ruĝa batalanto*. POUM-a gazeto por la milicianoj

7 *Ni*. Gazeto de la anarĥiista grupo La Amikoj de Durruti

tante la kolektivigon de la ekonomio, ĉesigante la kontrolon pri la distribuado kaj la merkato por helpi la spekulantojn kaj la aĝiotistojn, organizante bombastajn kaj provokajn kontraŭrevoluciajn manifestaciojn, kaj finfine starigante ĉe la publika forto plene malpravigeblan malamikecan spiritostaton kontraŭ la revoluciaj laboristaj organizoj.

La provoko

Ĉiuj tiuj faktoj ege pravigis staton de maltrankvileco ĉe la laborista klaso, kiu vidis, kiel oni forrabis ĝiajn atingojn dume la kontraŭrevolucio gajnis ĉiutage novajn postenojn. Aliflanke la reformismo –rekta agento de la kontraŭrevolucio–, kuraĝigita de siaj progresoj, iĝis ĉiam pli insolenta kaj streĉis sian politikon pri provokado. Dum la semajno, antaŭanta la tragikajn okazintaĵojn, la revoluciaj laboristoj vivis je stato de nervozeco, kiu atingis sian plej alta streĉon kaŭze de la klopodo okupi Figueras-n fare de la policistanoj, de la okazintaĵoj de Puigcerdà kaj de la entombigo de la UGT-a aktivisto Roldán Cortada, viktimo de atenco, kiun ni ne hezitas kondamni energie, kaj kiu estis preteksto por organizi manifestacion klare kontraŭrevolucian.

Je tiuj ĉi cirkonstancoj la 3an de majo vespere la publika forto laŭ instrukcioj de A. Aiguadé, ministro pri ena sekureco kaj reprezentanto de Esquerra Republicana⁸ ĉe la registaro de la *Generalitat*, kaj sub la persona kaj senpera direkcio de la ĝenerala komisaro pri publika ordo Rodríguez Salas, ano de la PSUC, klopodis okupi la konstruaĵon de la telefonkompanio, kiu estis kontrolata de la laborista organizo. La kontraŭrevolucio taksas maturaj la kondiĉojn por klopodi atakon kontraŭ iu el la pozicioj konkeritaj de la proletaro je julio. Ne temas ankoraŭ pri findecida ĉiomampleksa atako, sed pri provo. Sed ĝi ege miskalkulis. La laboristoj de la telefona centralo reagis energie antaŭ la atenco, kiun ili suferis, kaj okazis perforta kolizio. Tuj intervenas la registaro kaj la komitatoj de la sindikataj organizoj, kiuj plublikigis anoncon karakterizatan de la neklareco, kiu supozigas ke la konflikto estas survoje al solvo.

Sed la laboristoj, koleriĝintaj, ne kontentiĝis per tio. Ili komprenis, ke ne temas pri izola ago, ke danĝeras ĉiuj iliaj atingoj, kaj spontanee ili prenis la armilojn, ĉirkaŭumis la telefonan centralon, starigis barikadojn tra la tuta urbo, kaj komencis sangoplenan lukton, senprecedencan je ties perforteco kaj amplekso ĉe la historio de nia revolucia movado, sekve al kiu estis centoj da mortintoj kaj vunditoj.

La vigla reago de la barcelona proletaro estis misprezentita de la reformemuloj kiel la rezulto de faŝista provoko animita de nia partio. Majstroj pri kalumnio kaj misfamigo, kulpigante la revoluciulojn, ili klopodas eviti sian akiritan teruran responson pri la elverŝita sango.

8 ERC: Esquerra Republicana de Catalunya (Respublikana Maldekstro de Katalunio)

Ĉar la majaj tagoj estis rekta kaj tuja rezulto de monstra provoko de la PSUC, ĝi uzis, por realigi sian celon, tiun strasan Noske, perfidulon al la proletaro, nomatan Rodríguez Salas. Sub tiu cirkonstancaro prezenti la majan okazintaĵojn kiel "interfratan lukton", kiel perfortan kolizion inter "la du sindikataj centraloj", estas volonte falsigi la faktojn, ĉar la tuta mondo scias, ke la lukto okazis inter la revoluciaj laboristoj, inter kiuj estis UGT-anoj, kaj parto de la publika forto. La afero, kiu estis decidanta surstrate, ne estis nura konflikto de pri-sindikata konkuro, sed multe pli profunda afero. Kaj la laboristoj, kiuj surstratiĝis kun la armiloj ĉemane, reprezentis la proletarajn celojn je tiu ĉi historia momento.

La sinteno de la POUM

Lastatempe nia partio ree estis insistinta pri la bezono taksu politike la problemojn stariĝintajn el la disvolvo de la milito kaj la revoluo. Ni estis eĉ asertintaj, ke la laborista klaso povus preni la povon sen bezono uzi la perarmilan ribelon: estus sufiĉonta ludigi ĝian egan influopovon, por ke la forto-ekvilibro favoru ĝin kaj oni povus starigi laboristan kaj kamparanan registaron sen kiu ajn perforto. Ne starigi la aferon tiel, je la kampo pure politika, signifus pli-malpli proksiman violentan eksplodon de la amasigita kolero de la laborista klaso kaj, kiel rezulto, spontanee, ĥaosan kaj senperspektivan movadon. Niaj aŭguroj efektiviĝis. La provoka sinteno de la kontraŭrevolucio determinis la eksplodon. Tamen, jam la laboristoj surstrate, la partio devis adopti sintenon. Kiun? Ĉu flankeniĝi de la movado, kondamni ĝin aŭ solidariĝi kun ĝi? Nia elekto ne estis malfacila. Nek la unua nek la dua sinteno akordigeblas kun nia eco de revolucia kaj laborista partio kaj, sen heziti unu solan momenton, ni elektis la trian: doni nian aktivan solidarecon al la movado, eĉ sciante, ke ĝi ne povis venki.

Se ĝia ekiĝo estus dependinta de ni, ni ne estus doninta la ordonon pri la ribelo. La momento ne favoris findecidan agon. Sed la revoluciaj laboristoj, juste koleriĝintaj antaŭ la provoko, kiu viktimitigis ilin, sin ĵetis al la batalo kaj ni ne rajtis forlasi ilin. Agi alie estus neindulgebla perfido.

Tiun devon diktis al ni ne nur nia naturo de revolucia partio, morale devigita alflanki la laboristojn, kiam ili prave aŭ malprave sin ĵetas fajre al la batalo por defendi siajn atingojn, sed ankaŭ la bezono kontribui per nia streĉo kanalizi movadon, kiu kaŭze de sia spontanea karaktero estis multe ĥaosa, evitante ke ĝi aliĝu al senfrukta puĉo, kies rezulto estu sangoplena malvenko de la proletaro.

La perarmila lukto disvolviĝis tiele, tiaj estis la impeto de la revoluciaj laboristoj kaj la graveco de la atingitaj strategiaj pozicioj, ke oni estus povinta konkeri la povon. Sed nia partio, malplimulta forto ene de la laborista movado, ne povis surprizi la responson alvoki tiun agvorton, tiom malpli, kiam la sinteno de la CNT-aj kaj FAI-aj gvidantoj, kiuj el la barcelonaj radiosendejoj urĝis la

laboristojn forlasi la lukton, starigis konfuzon kaj pelmelon inter la batalantoj. Sub tiuj ĉi cirkonstancoj, alvoki la laboristojn preni la povon estis ĵeti ilin al puĉo kun fatalaj sekvoj por la proletaro.

Oni devis disdoni agvortojn limigitajn al la movo. Tiel faris nia partio, postulante la eksigon de Rodríguez Salas kaj de Aiguadé, rektaj aŭtoroj de la provoko, la neniigon de la reakciaj dekretoj pri publika ordo kaj la starigadon de komitatoj pri la defendo de la revolucio. Kaj, kiam ni komprenis ke la daŭrigo de la movado kondukos nepre al la fiasko –ne kaŭze de manko de batala kuraĝo flanke de la laboristoj, kiuj faris verajn heroaĵojn, sed kaŭze de la malori-entiĝo produktita de la sinteno de la responsaj komitatoj de la revoluciaj sindikataj organizoj–, ni pritaksis, ke la interesoj de la proletaro postulis la finon de la batalo. Sed por tio ni juĝis nepre la plenumon de du kondiĉoj: la retiriĝo de la publika forto kaj la eltenado de la armiloj ĉemane de la laboristoj. La restadon de la publika forto surstrate oni povus taksi kiel malvenkon de la laborista klaso, kiam tiu ĉi fakte faris strategian retiriĝon. Krome ĝi estis provoko taŭga starigi novajn kaj perfortajn koliziojn. La senarmiligo signifis senigi la proletaron de la plej efika garantilo por ĝiaj atingoj kaj de la eblo alfronti ajnan kontraŭrevolucion klopodon aŭ faŝistan atakon. Sub la kondiĉo de tiuj agvortoj, la 8an matene ni konsilis al la laboristoj forlasi la lukton kaj reveni al la laboro.

Kaj ni fieras proklami, ke la sinteno de nia partio, kies prestiĝo pliiĝis rimarkinde inter la revoluciaj laboristoj, kontribuis finigi la sangoplenan lukton, okazintan ĉe la stratoj de Barcelono, kaj eviti ke la laborista movado estu frakazigita de feroĉa subpremado.

Per tiu rapida klarigo de la eko, disvolvo kaj rezulto de la tagoj de majo, la honesta leganto konvinkiĝos facile pri kiuj estis la veraj kaŭzantoj de la tragedio, pri tio, ke nia partio –hodiaŭa celo de la kolero de ĉiaspecaj kontraŭrevolu-
ciuloj– ne ludis la rolon de provokanto –kiel proklamas kriege tiuj, kiuj sekvas neniun celon krom defendi la interesojn de la burĝaro kaj sufoki la revolucion glorie estiĝinta la 19an de julio–, sed ke ĝi strikte plenumis la devon, truditane de ĝia senhezita fideleco al la proleta kaŭzo.

La instruadoj de la majaj tagoj

El la sangoplenaj tagoj de majo, alvokitaj havi egan influon sur la posta disvolvo de la hispana revolucio, la laborista klaso devas tiri la necesajn instruadojn, se ĝi ne volas senfrukta sian sinoferon.

Unua instruado. Ĉia abunda propagando, farita de la eta burĝaro kaj la reformismo dum monatoj pro la kontraŭfaŝista unueco, sekvis neniun celon krom ludi kun la sento pri unueco de la laboristaj amasoj kaj ties malamo kontraŭ la faŝismo por sufoki la revolucion kaj restatigi la burĝan ŝtatan maŝinaron.

Dua instruado. Tiu kampanjo realigita per la agitvortoj "unue venki la militon,

poste fari la revolucion", "ĉio pro kaj por la milito", kaŝis la realan celon sufoki la revolucion, nepra premiso por teni liberajn manojn kaj intertrakti "blankan" pacon. La iom post ioma nuligo de la revoluciaj atingoj, la minaco pri eksterlanda interveno –preskaŭ realiĝinta per la alveno de eksterlandaj militŝipoj al la barcelona haveno–, la ĉiam pli insistaj onidiroj pri ebla "Bergara brakumo"⁹, kiuj koincidis kun la provoko de la 3a de majo, estas klara pruvo pri tio.

Tria instruaĵo. Estas unusola progresema eliro el la nuna situacio por la proletaro kaj la milita venko: la povokonkero. Dum la majaj tagoj ĝi havis ĝin ĉemane. Se ĝi ne prenis ĝin estis ĉefe, ĉar ĝiaj tradiciaj organizaĵoj, inspiriĝintaj el la anarĥiista doktrino, ne sin prezentis la taskon kaj ĉar nia partio, kiu prezentis ĝin dum la tuta kurso de la revolucio, estas malplimulta kaj juna organizaĵo ankoraŭ ne sufiĉe forta por preni sur si la responson direkti la lukton al tiu celo. Pretigi la necesajn kondiĉojn por forpreni la politikan povon al la burĝaro estas la senpera kaj ĉefa tasko de la proletaro. Por tio nepras starigi la "Revolucian Laboristan Fronton", tio estas, arigi, cele kunordigi ties agadon, la laboristajn organizaĵojn, kiuj pretus oponi barilon kontraŭ la antaŭiĝo de la kontraŭrevolucio kaj antaŭenirigi la proletan revolucion. Iu el la konkretaj formoj de tiu Revolucia Laborista Fronto povas esti la KOMITATOJ PRI DEFENDADO DE LA REVOLUCIO, kiuj devas esti starigitaj ĉe ĉiuj laborcentroj, ĉe ĉiuj kvartaloj, ĉe ĉiuj urboj, kaj kiuj devas kunordigi ilian agadon per CENTRA KOMITATO PRI DEFENDO, kiu esprimu la volon de ĉiuj komitatoj.

Kvara instruaĵo. La venko de la laborista klaso estas neebla sen responsa direkto, kiu sciu, kion ĝi volas kaj kien ĝi iras, kaj kiu kunordigu la lukton. La REVOLUCIA LABORISTA FRONTO povas esti la bazo de tiu nepra direkto.

Kvina instruaĵo. La sinteno de la Hispana Komunista Partio kaj de sia filio en Katalunio, la PSUC, montris, ke tiuj partioj ne reprezentas nuran reformistan tendencon de la laborista movado, sed ke ili estas la avangardo kaj ilo de la burĝa kontraŭrevolucio. Tial, kvankam nepras la unikan fronton kun tiuj partioj kaj kun la etburĝaj organizaĵoj por la milita lukto kontraŭ la faŝismo, devas esti rezignita ĉia eblo de komuna ago ĉe la politika kampo. La reprezentantoj de la revolucia proletaro kaj la ekzekutistoj de la laborista klaso ne povas sidiĝi ĉe la sama tablo. Tial al la Popola Kontraŭfaŝista Fronto, sinonimo de kunlaborado inter klasoj kaj de kontraŭrevolucia politiko, oni devas kontraŭstari la REVOLUCIAN LABORISTAN FRONTO. PRO LA DEFENDO DE LA REVOLUCIO! PRO LA LABORISTA KAJ KAMPARANA REGISTARO!

La lukto inter revolucio kaj kontraŭrevolucio starigita en Hispanio estas ekkiranta novan fazon, kaj en tiu nova fazo la proletaro, instruita de la sperto de tiuj monatoj de lukto kaj ĉefe de la grandiozaj majaj tagoj, devas orientiĝi ĉiujn streĉojn cele firmigi sian klasan memstarecon, defendi la revoluciajn atingojn

⁹ "Bergara brakumo" aŭ "Pactraktado de Bergaro". Intertrakto finiganta la unuan karlisman militon. Oni vidu artikolon ĉe la Vikipedio (http://eo.wikipedia.org/wiki/Unua_Karlisma_Milito)

kaj sin pretigi por la konkero de la povo, nepra kondiĉo por starigi socialistan reĝimon, nursolan taŭgan regeneri la ekonomion de la lando kaj starigi ordon. Kaj oni ne diru, ke la revolucio fiaskigos la militon, al kies venka solvo ni dediĉu la maksimumajn energiojn. Estas kialoj pli ol klaraj supozoj, ke la "demokratiaj" potencoj intrigas aktive por trudi armisticon, kiun la hispanaj laboristoj rifuzas indigne. Kaj, tial ke la plej grava barilo kontraŭstaranta tiujn suspektindajn projektojn estas la ekzistado de la revoluciaj organizaĵoj, estas celo neniigi ilin de la publika vivo per kiu ajn rimedo.

Tamen la laborista klaso ne lasos sin trompi, per la sama heroa impulso, per kiu ĝi venkis la faŝismon en Madrido, Valencio kaj Barcelono la 19an de julio, kaj per kiu ĝi elverŝas malavare sian sangon sur la batalejoj, ĝi defendos la atingojn konkeritajn kaj prenos la povon sciante ke nur la venkanta proletara revolucio taŭgas irigi la militon ĝis ties lastaj konsekvencoj: frakasado de la faŝismo kaj starigado de la socialismo.

VIVU LA KOMITATOJ PRI DEFENDADO DE LA REVOLUCIO!
EKVIVU LA LABORISTA KAJ KAMPARANA REGISTARO!

Barcelono, la 12an de majo de 1937.

La Centra Komitato de la POUM

NIN, Andreu: *El significado y alcance de las jornadas de mayo frente a la contrarrevolución*. Manifesto de la Centra Komitato de la POUM eldonita la 12an de majo de 1937. Esperantigita de Jurgo Alkasaro el la versio elĉerpita de la *Fundación Andreu Nin*. (Piednotoj de la tradukinto)

<http://www.fundanin.org>